

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW
PAŹDZIERNIK 1927 OKTOBRO

Nr. 10. N-o

CZY ESPERANTO JEST JĘZYKIEM SZTUCZNYM?



DAWAŁOBY się, że stawianie takiego pytania jest naiwnością. Opinia publiczna nie ma wątpliwości pod tym względem i powszechnie Esperanto jest uważany za język sztuczny. Jeżeli jednak bliżej i głębiej zastanowić się na temat, co to jest język i co należy uważać za rzecz naturalną, a co za sztuczną w odniesieniu do języka, wtedy postawione pytanie nie będzie w swej odpowiedzi tak proste, jak się na pierwszy rzut oka wydaje. A więc przede wszystkim należy uprzytomnić sobie, że istniał okres w rozwoju gatunku Homo sapiens, podczas którego artykułowana mowa ludzka w znaczeniu dzisiejszym nie istniała. Ponieważ jednak doba dzisiejsza wykazuje około 3.000 języków wśród ludzkości, zatem musiał zaistnieć w rozwoju historycznym człowieka moment narodzin języka, względnie języków.

Nie mamy żadnych dokładnych informacji gdzie, kiedy i wśród jakich okoliczności nastąpił ten przełom ogromnego znaczenia w życiu ludzkości, przełom, który oderwał gatunek homo od środowiska zoologicznego i przerzucił go do środowiska nowego t. j. społecznego. Narodziny jednak, choćby pierwszego słowa w formie artykułowanej mowy z ustaloną wewnętrzną treścią nie odbyły się na drodze nadprzyrodzonego cudu, ale raczej na drodze wynalazku jednostki ludzkiej, która w instynktownym przebłysku świadomości stworzyła słowo, a więc ustaliła związek między dźwiękiem a przedmiotem, względnie pojęciem tego przedmiotu. Kto był zdolny wytworzyć pierwsze słowo, prawdopodobnie wytworzył ich więcej, ponieważ jednak słowo dla odosobnionej jednostki ludzkiej jest bez wartości, a cały jego doniosły wpływ i znaczenie występuje dopiero wtedy, gdy spełnia funkcje łącznikowe między szeregiem jednostek, więc przypuszczalnie ten pierwszy, a za nim wszyscy następni wynalazcy słowa i mowy prawdopodobnie zajęci byli jednocześnie krzewieniem swego wynalazku, uczeniem innych ludzi wynalezionych przez siebie słów względnie mowy. Proces ten posuwał się powoli i trwał bardzo długi okres czasu. Nie tyle może trudne

było formowanie nowych słów-dźwięków, co raczej popularyzowanie ich wśród ówczesnych ludzi, utrwalanie ich formy w pamięci, a znaczenia w mózgach tych dzikich i barbarzyńskich gromad ludzkich. Było bardzo trudno utrzymać jednolitość tworzącego się słownictwa, a tem trudniej im dalej od bezpośredniego źródła twórczości językowej.

Ponieważ wynalazek mowy nie powstał jednocześnie we wszystkich osiedlach ludzkich na kuli ziemskiej, a zatem z tych osiedli, w których powstał wcześniej, wyszły prądy i wpływy językowe, które docierały do takich osiedli, gdzie jeszcze nie powstał wynalazek mowy, względnie zdarzały się zjawiska skrzyżowania lub połączenia różnych prądów językowych. Wśród tych różnych okoliczności z biegiem wieków i tysiącleci wytworzyły się różne systemy dźwiękowej, artykułowanej sygnalizacji t. j. mowy, z pośród których około 3.000 po dzień dzisiejszy przetrwało na globie ziemskim, pod formą znanych języków. Jeżeli zatem początki powstania słów i mowy należało przypisać nie siłom nadnaturalnym, ale wynalazczości poszczególnych indywiduów ludzkich — to ta sama zasada ma zastosowanie i w dalszym ciągu przy wzbogacaniu się mowy w poszczególne nowe słowa oraz gramatyczne formy. Ta »sztuczna« droga tworzenia słów i form jest jedyną naturalną drogą w rozwoju każdego języka. Ten »sztuczny« sposób formowania mowy na potrzeby ludzkie wspierał się na setkach i tysiącach poszczególnych głów, obdarzonych zmysłem językowym, na przestrzeni długich wieków i tysiącleci. Ci nieznani autorowie nie zostawili śladów swego indywidualnego istnienia i zasług, całość zaś powstania językowego zjawiska opinia powszechna ujmuje we frazes: »języki powstały drogą naturalną«, nie orientując się, że ta »naturalność« właśnie polega na zsumowaniu się »sztucznych« pojedynczych wynalazków tych wszystkich, którzy wprowadzali do mowy coraz to nowe słówka lub nowe formy gramatyczne. Ten sam sposób tworzenia się każdego języka trwa nadal i w naszych czasach. Oczywiście, że nie zachodzi obecnie potrzeba dla języków rozwiniętych tworzenia słownictwa dla zagadnień przez język już opanowanych, ale ponieważ życie stale rozwija się i ciągle wkracza w nowe dziedziny, które wymagają nowego słownictwa, zatem potrzebom tym czynią zadość znowuż ci często nieznani autorowie, wprowadzając do języka powszechnego nowe słowa. W ten sposób powstają terminologie w różnych dziedzinach wiedzy i zawodowej pracy. Powstają drogą »naturalną« przez »sztuczne« wprowadzenie nowych słów-dźwięków.

A teraz zwróćmy się do Esperanta z pytaniem, w jaki sposób on powstał, przyczem trzeba mieć na uwadze tylko to, co sam Zamenhof stworzył i w 1887 roku w świat wypuścił t. j. 16 reguł gramatycznych i 992 pierwiastki słownikowe. Zaczniemy od gramatyki: co w niej jest sztucznego? czy te końcówki poszczególnych części mowy o, a, e, i, czy

końcówka IV przypadku n, czy też liczby mnogiej j, czy końcówki czasów i trybów as, is, os, us, u?

W tych końcówkach niema nic sztucznego, przeciwnie można powiedzieć, że one są naturalne, bo wzorowane są na »naturalnych« językach. Przecież Zamenhof nie mógł skopjować żadnego z licznych języków w całości i z pośród tysięcy »naturalnych« form i końcówek musiał wybrać lub ustalić jedną, zatem ustalił ją pod formą najprostszą i najlogiczniejszą. Ten czyn był jego »sztuką«, ale podłoże, na którym dokonał wyboru było naturalnem. Te same uwagi odnoszą się w sposób jeszcze bardziej wyrazisty do »sztuki« Zamenhofa w wyborze pierwiastków słownikowych, których 90⁰/₀ jest żywcem wziętych z języków europejskich, te zaś pierwiastki, które zasługują istotnie na nazwę »sztucznie wymyślonych« występują w tych wypadkach, gdy w językach naturalnych ogromna rozbieżność i chaos uniemożliwiały wyekstrahować coś pośredniego i wspólnego.

Zamenhof jest zatem językowym twórcą, analogicznym do tych wszystkich, przyczyniających się do powstania i rozwoju języków naturalnych, a ta między nimi zachodzi różnica, że Zamenhof jest symbolem koncentracji ich wysiłków, rozproszonych w ciągu długich okresów czasu. Zamenhof sam jeden z pomocą 16 reguł i 922 słówek dał nowy język światu, podczas gdy na stworzenie języka włoskiego, francuskiego czy angielskiego złożyły się wysiłki bardzo długiego szeregu współtwórców. Dlatego to Esperanto jest językiem analogicznym ze wszystkimi językami naturalnymi i dziś śmiało może być nazwany naturalnym językiem europejskim.

Dr. Jan Mędrkiewicz.

ESPERANTUJO.

...Antaŭ mi etendis sin la nova el la tramigrataj landoj — Ŝovinujo. La suno jam estis subenirinta kaj sole malgrandaj nuboj en la okcidento, kolorigitaj ruĝe, kvazaŭ sange, montris, kie ĝi malaperis. Estis tre varme, eĉ preskaŭ sufoko. La naturo ŝajnis preta al fulmotondro; tiunokte ĝi ne okazis, sed kiel mi poste eksciis, ĝi okazadas tie tre ofte, eĉ pro malgravaj meteorologiaj kaŭzoj. Sufiĉas ia venteto, kie en landoj, havantaj alian klimaton, estus nur refreŝiga blovo.

Longe mi marŝis sur ŝtonplena, montara vojeto. Fine mi renkontis homon. Li rigardis min malafable kaj suspekteme. Mi salutis lin kaj demandis, ĉu li ne povus doni al mi rifuĝon por tiu ĉi nokto. „Kiu vi estas, fremdulo, el kia lando vi venas, kion vi volas en Ŝovinujo?“ Lia voĉo havis akcenton raŭkan, malagrablan; ni malfacile komprenis unu la alian. — „Mi venas el malproksima lando kaj iras pluen. Nur tiun ĉi nokton mi

deziras pasigi en via lando“ — „Kiel estas nomata via patrujo?“ — resonis la demando. Mi diris ĝian nomon. La trajtoj de la Ŝovino kuntiris sin, kvazaŭ trajtoj de kolera hundo, preta mordi. — „Al viaj civitanoj ni ne donas rifuĝon!“ — li diris kaj turnis al mi la dorson.

Restinte sola, mi iris pluen kun premita koro kaj larmoj en la okuloj, Tial do, ke mi estas fremdulo, oni ĉi tie rifuzis al mi rifuĝon. Mi decidis ne serĉi ĝin plu kaj kiel eble plej rapide trapasi la negasteman landon. Mi marŝis la tutan nokton. Ifoje nuboj kovris la lunon — tiam mi devis halti kaj atendi ĝian reaperon, ĉar sen ĝia pala lumo mi perdus la vojon. Ifoje leviĝis ventego, kvazaŭ baranta la vojon, tiel malfacile tiam estis iri antaŭen. Montara eĥo imitis rebruon de miaj paŝoj kaj ripetadis ilin multfoje. laŭte, laŭtege... Ŝajnis al mi, ke ĉirkaŭ mi marŝas iu nevidata, malamika armeo. Iu stranga timo preskaŭ paralizis miajn piedojn. KREDU — similan nokton mi neniam travivis.

* * *

Fine la densa mallumo komencis maldensiĝadi. La vojo etendis sin deklive — mi malsuprenmarŝis en valon. La ŝtonoj de l' montara vojeto jam ne tiel dolore vundis miajn lacajn piedojn. En la matena nebulo vibris rozaj radioj de la leviĝanta suno, kvankam rokaj muroj ŝirmis ĝin ankoraŭ de miaj okuloj. Sed la rokoj finiĝis kaj nenio plu kovris al mi la grandiozan pejzaĝon...

Antaŭ mi etendis sin granda valo, kovrita per herboj kaj floroj, roze lumigita de la aŭroro. La horizonton kovris nebulo kaj la valo ŝajnis esti senlima — oni preskaŭ ne vidis, kie finiĝas la tero, kaj kie komenciĝas la ĉielo. La tuta valo aspektis, kvazaŭ mirinda, floranta ĝardeno. Nur proksime de mi, proksime de Ŝovinujo, la tero estis ankoraŭ ŝtonplena. Kaj tie, malgraŭ la frua horo, laboris senlaca plugisto. Per forta mano li direktis la plugilon, tiratan de du gaje henantaj ĉevaloj. Lia vizaĝo estis serena, kvazaŭ en ĝi respegulus sin la tuta pejzaĝo. Apud li ludis malgranda infano.

Ekvidinte min, la plugisto haltis. „Bonvenon al vi, fremdulo, de kie ajn vi venas!“ — Milde sonis lia forta voĉo. — „Plugisto — diris mi — mi venas el malproksima lando. En Ŝovinujo oni ne donis al mi rifuĝon tial, ke mi estas fremda. Mi migris la tutan nokton. Mi estas laca kaj tremas pro malvarma vento kaj nebulo“. La plugisto ridetis bonkore. La infano prenis min je la mano kaj kondukis en la verdan landon. „Vi ripozas en nia kabano kaj ne tremos plu pro malvarmo — diris ĝi, rigardante min sincere per siaj bluaj okuloj — Rigardu — jam leviĝas la suno...

Vi estas en Esperantujo!“

Lidja Zamenhof.

ZAMENHOF KAJ MICKIEWICZ.

Dum la Postkongreso en Varsovio s-ro Privat dufoje publike parolis, unue ĉe la monumento de Mickiewicz kaj due en la urbodomo, kaj en ambaŭ paroladoj li elmontris la spiritan similecon de ambaŭ geniuloj, li eltrovis en Mickiewicz idean antaŭulon de tiu mondkoncepto, kiu estas la bazo por nia Esperantismo. Tial prave s-ro Privat diris en la urbodomo, ke estonte esperantistoj simile, kiel nun, pilgrimos al Varsovio kaj metos florkronojn sur du tombojn: de Zamenhof kaj de Mickiewicz.

Por la tutmonda esperantista publiko eble malmulte konata estas la pola poeto Adam Mickiewicz. Feliĉe liaj ĉefaj verkoj jam apartenas al nia literaturo. Lia ĉefverko, eposo Sinjoro Tadeo, majstre estas esperantigita de la patro de esperanta poezio Antoni Grabowski. Same perfekte s-ro Dobrzański tradukis »Improvizacion de Konrad« el la granda dramo »Dziady«. Kvankam tiuj ĉi verkoj jam plene donas bildon de la genieco de l' aŭtoro, tamen ili ne sufiĉas por kompreni ĝuste komparon inter Zamenhof kaj Mickiewicz. Eĉ por Poloj, kiuj konis la verkaron de sia poeto, la eltrovo kaj aserto de s-ro Privat estis neatendita kaj frapanta. Ni mem ĝis tiu ĉi momento ne bone rimarkis parencecon inter Mickiewicz kaj Zamenhof. Ni tro al kutimiĝis rigardi Mickiewicz de iom alia vidpunkto, dume por penetrema okulo de esperantisto-alilandulo, kiu ekstudis verkojn de Mickiewicz, tiu ĉi parenceco kaj spirita simileco aperis klare kaj frapante. Kaj nur post tiu ĉi revelacio de s-ro Privat mi denove prenis la verkaron de Mickiewicz en la manon kaj jam per nia stelo gvidata mi trovis en ĝi abundan lumon, kiu plene pravigas la opinion de s-ro Privat. Ke tiu ĉi aserto ne estu nur vorta sed por ĉiuj konvinka, mi citos kelkajn frazojn de Mickiewicz, aldonante, ke por elĉerpi la temon vekitan de s-ro Privat necesus skribi specialan komparan studon:

Laboro — nia idealo,
Amikeco — nia devizo.
Iam la tuta mondo, harmonie
kunigante manojn,
Alprenu nian devizon, incensu
al niaj idealoj.

La infano de Dio estas kolektiva homo — la homaro.

Junulo ankoraŭ estas la kolektiva homo, kaj li iros kontraŭbatali malbonon.

La nacioj nur tiam kreskas kaj tiagrade havas vivorajton, se ili servas al la tuta homaro, subtenante aŭ defendante ian grandan ideon aŭ ian grandan senton.

Poloj sentas forte la fratecon de la popoloj kaj ili ĉie estas pretaj sange batali por la libereco.

En »Historio de estonteco« (1830) A. Mickiewicz antaŭvidis konstruon de fervojretoj, de grandaj vaporŝipoj-urboj, de flugilaj aeraj eskadroj, de »akustikaj instrumentoj, per kies helpo, trankvile sidante ĉe kameno en hoteloj, oni povos aŭskulti la koncertojn kaj publikajn paroladojn okazantajn en la urbo«.

La granda rusa poeto Puŝkin skribis pri Mickiewicz: »Multfoje li parolis al ni pri tempoj estontaj, kiam la popoloj, liberiĝinte de reciprokaj malamoj, formos unu familion«.

D-ro Jan Mędrkiewicz.

(El Nr. 38 Heroldo de Esperanto).

A N G U L O P O R V I R I N O J .

Ĝis nun la esperantista movado ne faris sufiĉan diferencon inter la esperantisto kaj esperantistino; oni eĉ povas opinii, ke tiu-ĉi diferenco ne ekzistas. Tamen la ordo de la aferoj en la naturo kaj en la homa societo postulas nepran diferencigon. Ekzisto de la vivo bezonas ambaŭ seksojn; socia vivo devigas nin konsideradi la diferencojn kaj similaĵojn. En nuna speciale postmilita tempo oni ofte diras, ke por vira laboro virinoj faras netolereblan konkurencon. Ĉu vere? Hodiaŭ ni ne tuŝos tro delikatajn punktojn, kiuj devigas pripensi multajn „por“ kaj „kontraŭ“. Nur unu punkto estas certa kaj fiksa: la virino por subteni la familian vivon devas oftege tre intense labori: ofte tiu-ĉi malforta sekso faras verajn miraklojn.

Niaj legantoj eble ankoraŭ ne konas tute novan, semajnan gazeton: *Kobieta Współczesna* (La Moderna Virino), eldonatan en Warszawa. Bonvolu konatiĝi kun ĝi; vi ne plendos. En la lasta No estas tre interesa artikolo de sino Męczkowska pri nuntempa virino. Kia nuntempa virino? demandas s-ino M. Ĉu tiu-ĉi, kiu en la vesto super la genuoj, je helaj, karnkoloraj ŝtrumpoj sidas ostentacie longajn horojn ĉe Lourse au en Ziemiańska*) apud tablo kun nigra kafo, fumante cigaredon; post ĉiu momento ŝi eligas skatoleton kun toaletaj iletaj, nigrigas brovojn, ruĝigas buŝon, blankigas nazon? tiun virinon ni ĉiuj sufiĉe konas kaj tiun-ĉi ni ne bezonas priskribi. Ŝia nuntempeco etendiĝas jam de longaj tempoj, de tute malnova epoko.

*) Konataj varŝavaj kafejoj.

Ŝi ĉiam estas, estis kaj estos sama kaj simila. Ŝia animo kaj moralo tute ne ŝanĝiĝis. Mensan dezertecon ĉiam ĝi plenigis per subtilaj, delikataj toaletaj agadetoj; antaŭe ŝi faradis tion kaŝe, hejme, hodiaŭ ŝi tion faras tute malkaŝe, ĉie ajn, kie ŝi sin trovas: en la kafejo, en balsalono, en prelegejo dum la prelego. Ni parolos hodiaŭ pri la virino ne nur nuntempa, sed pri la virino novtempa, kiun nuna homa societo ankoraŭ preskaŭ ne konas, aŭ nur tute malmulte, ĉar ŝi ne tiel ofte troviĝas sur nia ĉiutaga vojo, aŭ ŝi troviĝas nur dum seriozaj momentoj de la vivo. Tiu-ĉi novtempa virino vere ekzistas kaj ankaŭ ne estas iu postmilita kreaĵo: ŝi havas sian tradicion kaj sian historion. Ŝi estas senpere ligita kun la virino de la pasinta jarcento, kun la virino, kiu penadis rompi la ĉenojn de la antaŭjuĝoj kaj de la mallibereco, kiu serĉis nutraĵon por sia menso en malproksimaj landoj, ĉar en sia propra lando ŝi ĝin ne povis trovi. Kvankam la nombro de tielaj virinoj ne estis granda, tamen la mensaj kaj moralaj valoroj estis tiom freŝaj, allogaj kaj fortaj, ke ili tute sufiĉis por montri novajn vojojn kaj direktojn al la grandnombra virinaro. Tiun novan, sed jam de longe konatan vojon iras tiu-ĉi novtempa virino. Ŝi bone komprenas siajn devojn kaj rajtojn. Ŝi bonege scias, ke por la vivo estas antaŭ ĉio necesa taŭga, ekzakta preparo por la laboro kaj la posedo de ĉiuj rajtoj de la civitano. Tiel opiniante, la novtempa virino bone scias, ke ŝi povas kalkuli nur je siaj propraj fortoj, ke ŝi al si mem devas certigi sian ekziston, ĉar ne ĉiam favora sorto donos al ŝi edzon, kiu zorgos por ŝia vivo, klopodos por havigi al ŝi ĉiujn vivrimedojn; kontraŭe ŝi scias, ke eĉ post la edziniĝo ŝi ofte devos labori por ambaŭ kaj eĉ por infanoj. Dum la jaroj 1921—25 studadis ĉe la superaj lernejoj en Polujo je 28741 studantoj 8654 studentinoj. Nur ĉe varsovia universitato de post la 1925 jaro jam 661 virinoj akiris diplomojn. La nombro de la fakte okupitaj virinoj kreskas ĉiujare, tiamaniere, ke en la industriaj institutoj en 1925 je 294546 viroj estis 110105 virinoj. Ĉiu nun konsentas, ke la nuna laboro de la novtempa virino multe diferencas de la laboro de antaŭa virino, kiu plej ofte estis tute ne sufiĉe preparita por la gravaj taskoj de la vivo, kiu tre ofte nur estis devigita labori kaŭze de kruela sorto post perdo de sia unika nutranto, edzo, forrabita de iu ajn malsano aŭ alia kialo. Por la nuntempa virino laboro ne estas sorta puno, aŭ neatendita okazo, sed estas ofte la plej valora parto de ŝia vivo. Kiu do ne konas nuntempajn oferemajn kuracistinojn, instruistinojn, oficistinojn, kiuj kun vera amo kaj kun plena kontento oferas tutan sian vivon por sia amata ofico aŭ fako. Ĝenerale ĉiu virino laboras konscie kaj sindoneme, akurate, sed ŝi devas kontentiĝi je malgranda rekompenco por sia laboro: ŝi neniam ricevas la salajron egalan al la vira salajro: plue, ŝi nur escepte povas atingi superan gradon en la oficistaro. La virino sentas bone tiun

maljustaĵon sed komprenas, ke venos fine aliaj, pli justaj tempoj. Multon oni aŭdas hodiaŭ pri malekzisto de la familia vivo, pri la ruinigo de la moralo, sed ĉu la kulpo de tio ĉio ne estas dependa de la ambaŭ seksoj? ĉu vere nur la virino estas kulpa? ĉu oni ne rimarkas la facilanimecon, oni povas ĝin nomi postmilitan. Edziĝa epizodo kaj tuja disiĝo estas oftega solvo de la afero. Familio, infanoj oftege falas peze sur la virinan vivon. En hodiaŭa familio racia infanedukado estas plej ofte rimarkebla ĉe la virinoj, kiuj laboras fake samtempe kun sia edzo. En tiu-ĉi atmosfero de laŭforta, komuna laboro de ambaŭ geedzoj infanoj plej ofte al kutimiĝas al la bona ekzemplo de gepatroj. Bone instruita patrino ofte iĝas vera amikino de siaj infanoj, kiuj sub ŝia klera direkto ne restas malgrandaj homsimilaj bestetoj, sed jam sufiĉe frue komencas kompreni, ke ili ne estas solaj en la mondo, ne estas ankaŭ nur por esti amataj kaj karesataj de sia patrino, sed devas vivi en organizita rondo familia kaj en pli vasta rondo homa, por kiu ili havas diversajn devojn, ne nur rajtojn. Sub gvidado de instruita patrino infanoj kreskas kiel veraj, kleraj, instruitaj individuoj homaj, komprenantaj homajn bezonojn kaj suferojn, ĝojojn kaj malĝojojn. Oni povas esti certa, ke la estonta prospero de la tuta homaro dependas de la nuntempa virino: grava estas ŝia respondeco!

En la sama Nro de la gazeto ni vidas belegan bildon de Sino Michalina Mościcka, Prezidantedzino, kiu antaŭ nelonge festis sian nomtagon. Ĉiuj, kiuj havis okazon konatiĝi kun la modesta, ĉiam agema, oferema kaj samtempe altgrade klera Persono de Sino Prezidantedzino, vidas en Ŝi veran modelon de edzino, patrino kaj civitanino. Dum vere malfacilaj politikaj cirkonstancoj de sia patrujo sub la rusa registaro ŝi estis devigita forlasi patrujon, kiel junedzino kaj zorgeme klopodadi por subteno de la vivo en Londono dum kvin jaroj. Kiel profesoro de ĥemio en Friburgo (Svisujo) kaj poste en Lwów S-ro Mościcki faris multajn gravajn sciencajn, praktike tre valorajn malkovrojn. Sino Mościcka, edukante tri filojn kaj unu filinon, havis ankoraŭ tempon kunlaboradi en la urba konsilantaro. Dum la milito ambaŭ geedzoj multege zorgis kaj protektis militistojn kaj militistajn orfojn. Ankaŭ kiel Edzino de la Prezidanto de la Respubliko, Sino Mościcka multe partopronas en la socia agado kaj laboro, precipe kiel protektantino de la Pola Komitato por la helpo al infano.

La Porinfana Helpo sub la gvidado de kelkaj grandanimaj personoj disvolviĝas modele en tuta Polujo, speciale en Warszawa, kie inter aliaj ekzistas: fame konata malsanulejo por infanoj, Szpital Anny Maryi, Guto da Lakto, Lerneja Konsilejo kaj multaj aliaj, pri kiuj ni pli detale siatempe parolos. Estas ankoraŭ tre interesa kaj grava Pedologia Konsilejo, en kiu oni donas konsilojn al gepatroj, kiamaniere oni devas konduti rilate al malfacile edukeblaj infanoj. Institucio tre grava por multaj gepatroj kaj infanoj.

Ostdeutsches Volksblatt Nro 39 publikigas sciigon, ke Fraŭlino Dro Dorothy Jordan Lloyd de Birmingham, estis nomita Direktoro de la Esploroj por Brita Tanmetio, kiel plej konata ĥemiistino-specialistino de la mondo en tiu-ĉi direkto. Tio estas ankaŭ unu pruvo de la virina scienca kapableco.

E K O N O M I A F A K O.

FR. DĄBROWSKI.

LA KOOPERATIVA MOVADO DE KONSUMANTOJ EN POLUJO.

(F I N O).

Krom la centraj unuiĝoj ekzistas ankaŭ kooperativaj institucioj de ĝenerala karaktero.

Al ili apartenas:

1) Societo de Kooperativistoj en Warszawa, fondita en 1906. Ĝi estas libera diskut-loko por reprezentantoj de la diversaj tendencoj en la pola kooperativa movado. Ĝiaj fondintoj estis: Edward Abramowski, la plej eminenta teoriulo de kooperativismo en Polujo, fama ankaŭ kiel sociologo kaj psikologo, — Stanisław Wojciechowski estinta Prezidanto de Pola Respubliko kaj Romuald Mielczarski, la du kunfondintoj de la postea Centra Asocio de Konsumkooperativoj.

2) Scienca Instituto de Kooperativismo en Kraków — Uniwersytet, estas komuna propraĵo de ĉiuj centraj organizoj koop. de Polujo. Ĝi eldonas specialajn librojn, kolektas centran bibliotekon kooperativan, gvidas akademiajn kursojn kaj centran gazetlegejon kooperativan.

3) Kooperativismo kiel lernobjekto estas prelegata en 4 altlernejoj de Varsovio, en la Universitato de Kraków, instruata en ĉiuj unuagrada agrikulturaj kaj kelkaj komercaj lernejoj.

4) Kooperativoj de lernantoj en multaj popol- kaj faklernejoj, ludas treege gravan rolon en la edukado al praktika kooperado (kunlaborado) de la juna generacio. Simile gravan edukan rolon ludas la

5) Militistaj Kooperativoj kun sia kelkcento da butikoj, razejoj, banejoj, legejoj k. a.,

6) Sindikato de Kooperativaj Laborantoj, havas samtempe profesian kaj kultur-klerigan karakteron.

La plej grava centro de konsumkooperativoj estas ZSSRP. (Centra Asocio de Konsumkooperativoj de Polujo). La Asocio dividiĝas je 4 sekcioj: Komerca, Asekura, Reviza kaj Kultur-kleriga.

La komerca Sekcio de l'Asocio havas, krom la centra Pogrand-Vendejo en Warszawa, 27 filiojn en la diversaj urboj de l' lando kaj 2 agentejojn eksterlande—en London kaj Gdańsk (Danzig). Ĝi vendis en la jaro 1927 varojn por la sumo de 54,000.000 zloty. La Asocio eksportas ankaŭ eksterlanden ovojn kaj kurbitajn meblojn.

La statistiko de la aliĝintaj societoj montras por la jaro 1925 la ĝeneral-spezon de 98 kaj duono milionoj da zloty, t. e. 441% pli ol antaŭ la mondmilito.

El la aliĝintaj konsumkooperativoj 139 gvidis en la jaro 1925 propran produktadon, precipe bakejojn, parte buĉejojn k. a. kun la ĝenerala spezo de pli ol 13 milionoj da zloty.

La Asocio mem komencis sian pli grandskalan produktad-laboron en la jaro 1920 kaj estas hodiaŭ posedanto de: 1 granda sapofabriko en Kielce, 1 fabriko de ŝupasto, 1 fabriko de sukeraĵoj, 1 granda muelejo. La tuta produkcio atingis en la jaro 1926 la sumon de 2,687.692 zł. La leĝe registrita marko de la produktoj de ZSSRP estas nomata „Społem“.

La Asekura Sekcio asekuras proprajn de aliĝintaj societoj kaj de sia propra havaĵo kontraŭ brulo kaj ŝtelado. Ĝi ankaŭ gvidas pensian kason por la koop. oficistoj kaj laboristoj.

La Reviza Sekcio de l'Asocio, alportas al la aliĝintaj societoj multan instruan helpon en librotenado, organizado kaj leĝa protekto.

Kultur-kleriga laboro de koop. Societoj. Ĉe multaj konsumkoopera-tivoj de Polujo oni trovas: bibliotekon, gazetlegejon, ĥoron, grupon de amatoroj-artistoj ktp. Ili aranĝas teatrajn prezentadojn, ekskursojn, somer-koloniojn por infanoj, organizas koop. kursojn k. a.

La kultur-kleriga laboro de la Centra Asocio de Konsumkoopera-tivoj prezentiĝas sufiĉe riĉe kaj diversflanke. La Asocio eldonas: 1 popularan semajnan organon „Spółnota“ (La Komuneco), 1 dusemajnan organon „Społem“ (Komune), aperantan de post 1919. De 1921 ĝis fino de 1926 ĝi eldonadis ankaŭ sciencan monatorganon „Rzeczpospolita Spółdzielcza“ (Koopera-tiva Respubliko).

Krom la konstanta eldonado de kooperativaj gazetoj eldonis la Asocio dum sia 15-jara ekzistado jam pli ol 70 diversajn librojn kaj broŝurojn kooperativajn, inter ili la verkojn de Abramowski, (unua kompleta eldono), Poisson, Tugan-Baranowskij, Wojciechowski, Müller k. m. a. Ĉiujare ĝi eldonas unu poŝ-kaj 1 grandan almanakon kooperativan. Krom tio organizas la Asocio ĉiujare diversajn kursojn por la kooperativaj laborantoj.

Por pliefikigi la propagandon inter la amasoj la Asocio eldonis ankaŭ multon da diversaj propagandafiŝoj kaj afiŝetoj, ilustritajn poŝtkartojn, kliŝojn por lumbildoj ktp.

K R O N I K O.

ĈEESTO DE S-RO PREZIDANTO IGNACY MOŚCICKI EN KRAKÓW.

Nia malnova urbo, antaŭjarcenta sidejo de polaj reĝoj kaj de tiom multaj mondfamaj homoj de la arto, scienco, politika agado, industrio, homoj de unuaranga valoro morala! nia urbo de valoregaj memoraĵoj, historiaj monumentoj kaj dokumentoj, urbo, kiu subtenis nian propran, nacian vivon dum la plej malluma tempo de nia mallibero, havis la honoron gastigi dum du tagoj la Prezidanton de Pola Respubliko. Dum oni mal-permesis al niaj infanoj paroli pole, kiam oni ne rimarkadis Polujon eĉ ĉe niaj nunaj amikoj, Kraków obstine kontraŭbatalis; ĝis fine la justeco venkis.

Post 140 jaroj unuafoje Kraków havis okazon vidi Unuan Mastron de Polujo inter siaj muroj. Reĝa kastelo Wawel, kun la fama sonorilo Zygmunt (Sigismundo) gastigis fine unuan polan civitanon, tiel longe ne viditan. Vere ekĝojis tuta krakova loĝantaro, ekbrilis ĉiuj okuloj, vigle ekbatis ĉiuj koroj. Vivu Prezidanto Mościcki! oni aŭdis ĉie, kie oni ekvidis Simbolon de la nacia Majesteco.. Oni devas aldoni, ke la persono de nia Prezidanto estas ĉie en Polujo vere estimata kaj amata. Du ĝojaj tagoj

forkuris kiel sonĝo. Prezidanto forlasis Krakovon kaj veturis al Ŝląsk (Silezio), kiu antaŭ nelonge dum sanga batalado devis pruvi sian apartenon al Polujo. Ĉu neniam ĉesiĝos similaj pruvoj? Ĉu ili estas nepre bezonaj por ĉiam nekomprenema homaro? Ĉu venos iam la tempo, kiam la homoj starante unuigitaj, brako ĉe brako, ekkantos kune nian esperantan himnon? Ni esperu, ke tiu tempo alproksimiĝas, ke ĝi estas jam proksima. Tio-ĉio dependas nur de ni, kiuj estas homaranoj. Nur ni multobliĝu!

Dum la ĉeesto de la Prezidanto en la urbo ekregis vera amikeco inter ne ĉiam konkordemaj politikemuloj. Ĉiuj sentis gravan momenton, kiun ni travivis. Ĉiuj festis grandan feston de paco kaj amo!

Oni povis rimarki nek politikajn nek religiajn, nek naciajn diferencojn. Ĉiuj agadis en agordo kaj vera konkordo.

Unu epizodo. Polaj Legionanoj honoras Sron Prezidanton, oferante al li Legionan simbolan krucon kun inskriboj kaj rubandoj. Antaŭeniras unu legionano, montarano el Zakopane, nome Galica, kaj oferes al la Prezidanto bastonon, kutime uzatan dum ekskursoj, tiel nomatan „ciupaga“. Ingo estas en la formo de la hakilo. Levante supren hakilon, „tio-ĉi estas, por niaj malamikoj — li diras — sed, tiu-ĉi malsupra parto, Sinjoro Prezidanto, estos por ni mem, kiam ni estos malsaĝaj“. „Se nepre necesos“ respondis ridante la Prezidanto. Ni nenian vidis S-ron Mościcki tiel ridantan.

LETERO DE PROF. BAUDOIN DE COURTENAY AL PROF. BUJWID KONCERNE LA „INTERLINGVA“.

Traleĝinte la sciigon, ke la Krakova Universitato anoncis prelegojn pri Interlingva mi skribis al nia plej konata lingvisto, petante lin pri la opinio, ĉu tiu-ĉi lingvo havas iun specialan valoron. Ĉi sube mi tradukas la ricevitan pollingvan respondon:

Kara S-ro Kolego!

S-ro Jezierski antaŭ kelkaj jaroj klopodis pri enkonduko de la Interlingva ĉe la Poznania Universitato, sed ne estis allasita. Multe lin subtenis W. M. Kozłowski, filozofo, kontraŭstaris tamen Ułaszyn, lingvisto, kiu preferis Esperanton. En Krakovo varmege subtenas In-on Banachiewicz, astronomo, same kiel en Warszawa Dickstein, matematikisto. Tiu artefarita lingvo estas elpenŝaĵo de prof. Peano, matematikisto el Torino, kiu en 1908 au 1909 dum la kongreso de diversaj artefaritaj lingvoj faris sian proponon. Mi estis tiam unu el partoprenantoj pri la decido. Kongreson aranĝis francaj scienculoj: Couturat kaj Leau. Ni donis preferan lokon al Esperanto, plimulto tamen kun Ostwald, Couturat, Leau kaj Jespersen decidis plibonigi Esperanton kaj kreis Idon, kiu en certaj rilatoj superas Esperanton, sed en aliaj cedas.

Laŭ mia opinio, post certa tempo oni eltrovos tute novan lingvon artefaritan, ankoraŭ pli perfektan ol ĉiuj ĝisnunaj. Sed ĝis nun Esperanto superas aliajn, ankaŭ praktike ĝi estas preferinda, ĉar ĝi estas plej multe disvastigita.

Mi havas nenion kontraŭ enkonduko de la Interlingva, sub la kondiĉo, ke oni enkonduku samtempe Esperanton. *Interlingva taŭgas bone por la scienculoj, sed por la vastaj publikaj rondoj multe pli necesa estas Esperanto.*

Koregajn salutojn

B. de C.

Szanowny i kochany Panie Kolego!

P. Jezierski starał się przed paru laty o docenturę Interlingwy w Poznaniu, ale kandytura jego nie została przyjęta. Popierał go bardzo filozof W. M. Kozłowski, przeciwny mu zaś był m. i. lingwista Ułaszyn, uznający wyższość Esperanta. W Krakowie reklamuje Interlingwa b. gorąco astronom Banachiewicz, tak jak w Warszawie matematyk Dickstein. Ten język sztuczny jest wymysłem matematyka Turyńskiego Peano, który występował w Paryżu w r. 1909 (czy 1908) na konkursie różnych sztucznych języków międzynarodowych. Ja wtedy byłem jednym z uczestników w ocenie konkurentów. Urządzali ten kongres uczeni francuscy Couturat i Leau. Daliśmy pierwszeństwo Esperantu, ale większość z Ostwaldem, Couturat, Leau i Jespersenem na czele postanowiła udoskonalić Esperanto i stworzyć Ido, które pod pewnymi względami przewyższa Esperanto, ale pod innymi mu ustępuje.

Według mego zdania, z czasem będzie wynaleziony nowy język sztuczny, doskonalszy od wszystkich dotychczasowych. Dotychczas jednak Esperanto stoi najwyżej, a ze strony praktycznej ma to za sobą, że jest najbardziej rozpowszechnione.

Nie mam nic przeciwko lektoratowi czy też docenturze Interlingwy, ale pod warunkiem równorzędnego istnienia wykładu Esperanta. Interlingwa dobra jest dla uczonych, ale dla szerokiej publiczności nierównie potrzebniejsze jest Esperanto.

Najlepsze życzenia

J. Baudoin.

UNUA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ EL OKCIDENTA POLUJO.

En Poznań okazis granda esperanto-festo, dum kiu ni diskutadis pri la vigligo de la esperanta movado, kiu bedaŭrinde, pro malkompreno kaj tute aparta opinio de la tiea societo, ankaŭ flanke de la loka Gazetaro, preskaŭ ĉesis ekzisti.

Dank'al klopodoj de la vigla samideano, universitata profesoro Dro Stanisław Nowakowski, kiu kunvokis la 9 de oktobro la diritan kongreson, la movado sendube ree antaŭen iros post la ricevo de novaj fortoj.

La unua antaŭtagmeza kunveno okazis en la prelega salono de la Universitato; ĉeestis cirkaŭ 60 personoj de la delegitoj kaj simpatiuloj, kiuj interesiĝis pri la organizo de la kongreso mem. La dua kunsido, kiu daŭris de la 3 ĝis preskaŭ 9a horo vespere, kunigis pli ol 200 personojn. La programo estis vere ampleksa. Prezidis S-ro Dro Nowakowski, kiel prezidanto de la organiza komitato, anstataŭantoj estis: merita prezidanto de la poznanja Esper. Societo S-ro Rektoro Pastro Nikodem Cieszyński, Prezidanto de la Pol. Esp. Del. Prof. O. Bujwid el Kraków; kiel sekretarioj estis elektitaj: S-ro Dro Dziedzic kaj S-ro Prengel (Bydgoszcz kaj Toruń). S-ro Okoniewski, kiel sekretario de la esp. societo en Poznań, priparolis agadon de la societo, kaj aldonis, ke la merita sekretario S-ro Kapela, nune malsana, ne povas partopreni la kongreson. Oni akklamis la proponon prezenti al li salutojn kaj bondezirojn de la baldaŭa resaniĝo. S-ro Prengel priparolis viglan movadon en Bydgoszcz. kiu fervore laboras por la esp. movado (aplaŭdoj). Antaŭtagmeze oni priparolis ankaŭ aliajn organizajn detalojn.

Posttagmeze malfermis la kunvenon S-ro Pastro Cieszyński, fervore instigante multenombrian ĉeestantaron kunlabori en tiu-ĉi vera kunfratema afero kaj agado, malgraŭ ĉiu malkompreno, kiu ĝis nun nin ĉirkaŭas (grandaj aplaŭdoj). Prof. Bujwid prelegis pri la komencoj kaj la disvolviĝo de la helpaj lingvoj, ĝenerale, kaj pri la valoro de la esp. lingvo por la scienco. Univ. Prof. M. Rudnicki, pri la rajtoj de la ekzisto de internacia lingvo; S-ro Pastro Cieszyński pri Esperanto kaj Eklezio; S-ro Prof. Nowakowski pri Esperanto en lernejo; S-ro Dro Dziedzic pri Esperanto kaj trafiko; S-ro Prengel (Bydgoszcz) pri la esper. gazetaro; S-ro Borkowski (Poznań) pri la organizo de la interacia esp. movado. Ni ne povas detale priparoli ĉiujn paroladojn; sendube ili estos publikigitaj. Ni devas nur aldoni, ke disvolviĝis vigla diskutado, kiun partoprenis inter aliaj: universitataj profesoroj S-ro Ułaszyn, konata lingvisto, Prof. M. Rudnicki, Prof. Glixelli, S-ro Neumayer el Grudziądz, S-ro Tichawski el Katowice kaj multaj aliaj. Oni ne povas forgesi, ke la sama tago de la kongreso estis ankaŭ la 15-jara datreveno de la ekzisto de Esperanto-societo en Poznań. Nur ne multaj, unuaj kreintoj povis ĉeesti la kunvenon: oni povis aplaŭdi nur S-rojn: Prezidanton de la societo S-ro Rektoron Pastron Nikodem Cieszyński, plue Brzeziński, Krzyżankiewicz kaj Maliszewski.

Oni priparolis ankoraŭ la neceson de la organiza komitato por vigligo de la movado, kiun oni ankaŭ elektis; oni fiksas la lokon de la proksima kunveno: Bydgoszcz. Oni partoprenos ankaŭ la konferencon de la Pol. Esp. Del. en Warszawa la 5—6 oktobro (oni preferis ŝangi la daton antaŭe fiksitan: 29—30, ĉar antaŭ la 1 de ĉiu monato ĝenerale mankas al ĉiu mono).

Estas menciinde, ke la Gazetaro en Poznań ne plu estis tiel malfavora por la kongreso, kiel ĝis nun.

K O M U N I K A Ĵ O J D E L A P. E. D.

II. Konferenco de P. E. D. en Warszawa, kiu devis okazi la 29—30. X. k. j., estas lau peto de multaj grupoj prokrastita je kelkaj tagoj kaj okazos la 5—6. XI. k. j. La grupoj estas petataj komuniki senprokraste al ĝen. sekretario nomon de la delegitoj, citante la nombron de reprezentataj membroj. En okazo de anstataŭo ne forgesu doni rajtigilon al la delegito, kiu devas ĝin prezenti dum la Konferenco. La grupoj, kiuj ne pagis ĝis nun la kotizon por la lastaj monatoj, devas la pagon efektiviĝi nepre antaŭ la Konferenco.

Pro ŝanĝo de la dato akceptas la sekretariejo proponojn por la Konferenco ankoraŭ ĝis 25. X. k. j. Ni atentigas, ke proponoj ne prezentitaj ĝis la supra dato al la Ekzekutiva Komitato, ne povos esti diskutataj dum la Konferenco, sed estos komisiitaj al la Ekzekutiva Komitato por pristudo.

Aliĝojn kun la kotizo Zł. 2.— bonvolu de nun direkti senpere al loka komitato de la Konferenco laŭ adreso: Halina Weinsteinówna, Warszawa, Leszno 99/5. La loka komitato zorgas pri necesaj loĝejoj kaj fervoja rabato. Bonvolu sin turni al la loka komitato kun ĉiuj demandoj, rilatantaj al loĝejo, ĝia mendo ktp.

Programo de la laborkunsidoj entenas:

- 1) Raportoj.
- 2) Propagandaj aferoj (kelkaj referatoj).
- 3) Ŝanĝo de la regularo — propono de P. S. E. S., Warszawa.
- 4) Balotoj.
- 5) Proponoj kaj demandaj.

La ĉeesto de ĉiuj pollandaj grupoj dum la Konferenco estas necesa, ĉar estos priparolataj gravaj organizaj demandoj.

Aliĝis al P. E. D.: Laborista Esperantista Societo „Laboro“, Warszawa.

Vojevoda distrikta Konferenco de P. E. D. okazos la 13. XI. 1927 en Kraków je la 11-a horo antaŭtagmeze en Muzeum Przemysłowe, Smoleńska 9. Ĝi celas organizon de distriktestraro kaj labordifinon por la jaro 1928. Aliĝojn direktu al Societo „Esperanto“, Kraków Smoleńska 9.

Ekzekutiva Komitato de P. E. D.:

Prezidanto: *Prof. Dro O. Bujwid.*

Ĝen. sekretario: *J. Alfus.*

E L L A P O L L A N D A G A Z E T A R O .

Ilustrowany Kurjer Codzienny, la plej disvastigita pola ĵurnalo favoras esperantan movadon kaj lastatempe ofte publikigas artikolojn, kiuj montras grandan internacian signifon de la esperanta lingvo.

En la N. 258 ni legas tre interesan artikolon de sro Trochimowski, priparolantan la tradukojn el la pola literaturo esperanten; oni povas konstati, ke la plej valoraj polaj literaturaj verkaĵoj, konataj en Japanujo ekz. la verkoj de Mickiewicz, Sienkiewicz, Orzeszkowa, Prus, (Głowacki) k. aliaj estas disvastigitaj dank' al la esperantaj tradukoj de Grabowski, K. Bein, Belmont, lastatempe Lidia Zamenhof. B. Kuhl kaj aliaj konataj polaj esperantaj poetoj kaj stilistoj, kiuj konas ne nur la esperantan, sed ankaŭ scipovis enprofunduĝi en plej delikataj nuancoj de la pola lingvo.

Ni aŭdas, ke la Tutpollanda Ekspozicio en Poznań en 1929 jam tre vigle prepariĝas. En Warszawa kunvenis unuafoje la interministeria kunsido. Oni zorgos en tute proksima tempo krei ĉe ĉiuj ministerioj ekspoziciajn komitatojn por prilabori komunan planon de la agado. Por la Krakova arto oni penas konstrui specialan pavilonon.

Pluvegoj en sudorienta Malgrand-Polujo subakvigis grandajn kulturterenojn kaj kaŭzis multmilionajn perdojn al la loĝantaro. La registaro kaj multaj societaj rondoj laŭpove helpas kaj kolektas monon. Nia redakcio volonte povas peradi.

Oni sciigas, ke jam estis decidita la nova amerika pola pruntepreno je la kurzo: 92 por 100. En la Ministerio de financoj kunvenis Sroj: Młynarski, Czechowicz, Barański, Krzyżanowski kaj Wojtkiewicz por la fina priparolo de detaloj kun Amerikaj (New Yorkaj) delegitoj. 72 milionoj de dolaroj vigligos certe industrian vivon en Polujo.

La eksterlanda gazetaro konfirmas la sciigojn, ricevitaĵojn el Kowno (Kaunas-Litovujo) pri la persekutado de polaj instruistoj kaj de la pola minoreco en Litovujo. (Neue Freie Presse Wien).

D I V E R S A Ĵ O J .

Katowice. La ĉi-tieaj esperantistoj aranĝis en la Grandrestoracio de sro Nalepa, ul. Kościuszki, regulan gastotablon, apud kiu ili ĉiun merkredon kunvenas. Se fremdaj esperantistoj vizitos Katowice, ili havos okazon renkonti gesamideanojn je tiu tago post la 8a horo vespere.

En la lasta Nro de Pola Esperantisto oni erare ne citis nomojn de: sro Wiesenfeld kaj fino Szenfeldówna, kiel sekretarioj de la ferma jubilea kunsido en Warszawa.

Pola Esper Asocio en Warszawa komencis kursojn por Aviadistoj. Gvidas kursojn: S-roj Trochimowski, prof. Kaus kaj f-ino H. Weinszteinówna; partoprenas 50 lernantoj.

B I B L I O G R A F I O .

Aŭstralio Lando kaj Popolo. Originale verkita de A. Delsudo kaj Lauri Laiho. Eldonis Ferdinand Hirt u. Sohn en Leipzig 1927, Esperanto-Fako. 83 paĝoj 15 × 22 cm, 31 ilustraĵoj kaj landkarto. Prezo RM 6. Aĉetebla ĉe Libreja Fako de Pola Esperantisto.

Kiel falsan ideon mi havis pri tiu ĉi malproksimega lando, mi per tiu libro ekkonis. Mi pensis ekzemple, ke ĝi kaj ĝia loĝantaro estas pura, higiena, ordama, akurata kaj altkultura. Kaj mi sciigis: „maniero, per kiu oni manuzas bakistajn produktaĵojn dum la vendo, tute forpelas la jam vekitan apetiton. Se la kliento jam ne perdis sian apetiton kaj kuraĝon por plia aĉetado, li devas esti homo tre senantaŭjuĝa“. Aŭ alia bildo: „Sen jakto kaj ĉapelo kuras laktovendisto trans la strato kun sia kruĉo en la mano kaj brulanta cigaredo en la buŝo. Forte odorante je ĉevalo kaj ŝvitante pro la kurado, li mezuras la lakton, dum la ĉiama cigaredo ellasas iom da cindro en la kruĉeton“. Ordamon de Aŭstralianoj konigas jena priskribo: „la veturigistoj de ŝarĝoveturilo kie ajn ili restas je la 12-a horo, tie ili haltas kaj rapide ekbruligas fajron por boligi la teon, suriras sian veturilon, manĝas kaj eĉ en la centro de la larĝa strato komencas... kartludi“ kaj „precizeco ne estas praktikata, ili volonte atendas kaj atendigas unu la alian kaj diradas“ ho, tunoj da tempo“. Kulturgrado ankaŭ ne estas alta, ĉar: „Aŭstralianoj ne havas ambiciojn de kreanta menso, nek ŝatas grandajn taskojn“. Ne mirinda afero, kiam „la popolo ne havas inklinon al klereco ekster la aferoj de propra malvasta rondo“ kaj en rezulto „mezgrada Aŭstraliano scias en sia dudekkvina jaro, ke Aŭstralio estas bonega lando, konas laŭnome ĉiujn famajn kriketistojn, boksistojn, usonajn kinematografo-stelojn kaj scias la ŝancojn de ĉiuj vetkurĉevaloj“. Ni vidas do, ke priskribo estas vera, sen iaj „plibeligoj“. Tion rezultigas certe la stranga aŭtoreco de la libro. Unu el verkintoj estas... Finno kaj la dua Aŭstraliano. Ĝenerale la verko estas tre leginda, aspektas tre bele kaj senriproĉe. Ĝi certe estos unu el la plej belaj perloj en biblioteko de ĉiu esperantisto. Nur la prezo estas por ni, Poloj, ĉe kiuj la libroj estas malkaraj, tro alta.

Literatura informilo eldonata de la esper. fako de s-ro Hirth kaj filo en Leipzig en la 4 n-ro enhavas tre interesajn sciigojn pri diversaj, valoraj esperantaĵoj.

Artikolo de samideano Hohlov enhavas kelkajn valorajn vidpunktojn koncernantajn la 40-dekjaran jubileon de la esp.-movado. Tute prave li diras, ke la lingvo estas tiu perfekta kanalo, laŭ kiu normale kunfluos la malamikaj popolaj torentoj por formi la komunan, homaran familion. Ĝi mildigos la unuan kunpuŝiĝon, ĝi malfermos la animojn inter la imagataj malamikoj, ĝi forigos la ŝovinismon de la Nescio.

La Statutoj de la Esperanta Instituto por la Germana Respubliko, kaj ĝia ekzamenregularo estas imitinda de aliaj ŝtatoj, ne havantaj ĝis nun similajn institutojn. Estas ankoraŭ preparolita la internacia mondliteraturo kaj eldonaĵoj de la tre merita firmao. Bedaŭrinde, pro manko de loko, ni hodiaŭ ne povas doni pli detalan priskribon. Sed ni ofte revenos al tiu-ĉi afero.

El la Esperanto-Katalogo de la Eldonejo, Firmao Rudolf Mosse Berlin, Jeruzalema str. 46-49 ni povas juĝi, kiom multe da novaĵoj eldonitaj oni povas trovi, se oni deziras ekkoni esper. literaturon: 99 lernolibroj kaj vortaroj, 20 tre interesaj libretoj de la Biblioteko Tutmonda (eldono de la firmao Hirth kaj filo); 33 N-roj de la Esper. Biblioteko internacia; 20 Internacia Mondliteraturo; 10 Nova Esper. Biblioteko; 120 diversaj Poeziaĵoj, Romanoj, Noveloj, Rakontoj k. t. p. 34 sciencaj literaturaĵoj; 22 Muzikaĵoj kaj kantoj, 35 Esperantaĵoj ĝeneralaj; 10 germanaj gazetoj (ne ĉiuj eldonataj estas cititaj); diversaj propagandilojentute ĉiu esperantisto aŭ simpatiulo povas ĉerpi plenmane, nur oni ne devas esti troa ŝparemulo, vidante tiel grandan malŝparemon de ambaŭ germanaj, vere samideanaj firmaoj. Subtenu do altaniman penadon, aĉetu kaj legu. Certe ĉiu povos ricevi katalogon senpage, ni povas peradi, pere de nia redakto.

Slavo kaj B.

ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

I. GARANTIA FONDO DE »POLA ESPERANTISTO«.

Por Garantia Fondo de P. E. pagis jam:

S-o Marjan Karłowicz (Warszawa) — 2 zł., S-ino Neuberg por VIII — 10 zł., S-ino Rubinstein por VI — 10 zł. por VII. — 10 zł., por VIII — 10 zł., S-o D-ro I. Fragner (Wiśnicz) — 10 zł., S-o Edward Wiesenfeld (Warszawa) alvokita de S-o Prengel — 2 zł.

!! V I V U S E K V O N T O J !!

III. NIAJ REPRESENTANTOJ EN BIAŁYSTOK, KATOWICE, PARIS KAJ WARSZAWA.

Ni atentigas niajn ŝ. gelegantojn, ke ni donis reprezentadon de nia revuo: en Białystok al „Esperanta Societo Zamenhofa“, str. Zamenhofa 12a; en Katowice al „Societo de Esperanto Amikoj“, en Paris al s-o Salo Grenkamp, rue de Vaugirard 4; en Warszawa al „Pola Studenta Esperantista Societo“ Leszno 99 m. 5. Bonvolu do aboni, pagi anoncojn, mendi librojn kaj gazetojn ktp. pere de niaj reprezentantoj.

Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss.

Drukarnia Muzeum Przemysł. pod kierownictwem St. Baranowskiego w Krakowie, Smoleńska 9